

FEDERACIA KONGRESO EN SOMMIÈRES (27 IV)

Malgraŭ kelkaj obstakloj (kunveno meze de la prezidentaj balotoj, ekspozici-salono ne disponebla, ktp) la kongreso bone disvolviĝis en agrabla kaj taŭga loko. Ne okazis la aparta kunveno por la komitatanoj, simple ĉar ili ne venis je la indikita horo (eĉ tiuj, kiuj plej laŭte postulis tiun apartan kunvenon kaj kiuj tute ne venis!). Partoprenis preskaŭ 30 personoj el ĉiuj departementoj de nia federacio, inter kiuj pluraj novuloj, kiuj esperigas renaskiĝon de E° en Alès, Nîmes, ktp.

Post bonvenigaj vortoj kaj senkulpigo de pluraj personoj, la prezidanto Jean Hénin legis la tagordon kaj leteron de J. Chirac, tiam unu el la du kandidatoj por la dua prezidenta baloto. Diversaj opinioj aŭdiĝis. Lucette Négron faris la finanĉan raporton kaj J.H. kompletigis per la morala raporto. Diversaj respondeculoj komentis pri la vivo de la grupoj, la interkonatiĝo, la staĝoj, la partopreno en diversaj renkontoj kaj kongresoj, la vizitoj de eksterlandanoj, ktp. Naskiĝis nova grupo en Prades (P-O). La planita kampanjo en la gazetoj ne okazis, ĉar la koncerna persono ne prizorgis ĝin. Ŝajne polemikoj ĉesis. SFS regule aperas. Naciskale la varbkampanjo ne vere efikis. La forumoj de asocioj kaj la ĉiutagaj provoj konigi E-on restas la plej fidindaj rimedoj. Dankoj estis direktitaj al la gesamideanoj, kiuj partoprenis iugrade en la diversaj taskoj. Ambaŭ raportoj estis unuanime aprobitaj. Renovigo de la triono de la komitato: nur Patrice Brandy ne donis vivosignon. S. Authier, C. Gérard-Voinçon, L. Négron, M. Vidal, al kiuj aldoniĝas Claudine Poncy kaj Josée Boccadifluco (ambaŭ el la grupo de Montpellier) estis elektitaj por tri jaroj.

Por la venontaj monatoj oni antaŭvidas reprovi la kampanjon en la gazetaro en septembro. JH proponas aranĝi retkurson (eble C. Cayzac, kiu respondecas pri la perkoresponda kurso, povus transigi la tekstojn surreten). Nikolao Karatzaferis opinias, ke ne estas tiel simple kaj ke jam ekzistas tiaj kursoj, eĉ se la korektanto troviĝas eksterlande kiel en lia kazo (ŝajne avantaĝo sed fakte oni bezonas foje helpon de samlingvano kaj kontakton kun apuda persono). Estus bone, se dua grupo aldoniĝus al tiu de Béziers por la prelegvojaĝoj de UFE. Estis anoncataj pluraj baldaŭaj eventoj: en Narbonne okaze de la unua de majo, en Vias (staĝo), en Campagnan (3a amika semajnfino), en Valmanya fine de Julio, en Sète fine de Aŭgusto kaj kompreneble eksterlande (Alicante, Fortaleza, Verona).

Je Pasko 2003 Sat-Amikaro kongresos en Cap d'Agde. Prizorgas tiun kongreson Ges. Lafosse (Tuluzo), kiuj jam prizorgis la fervojistan kongreson en Port-Vendres ĉi-jare. Kompreneble la helpo de lokaj kaj federaciaj esperantistoj estas bezonata por tiu evento, kiu povus allogi ducent homojn. Ni invitos Josée k. Michel Lafosse al nia aŭtuna kunveno kaj povos tiam havi pli klaran ideon pri la stato de la afero, ankaŭ pri la eventuala peto de subvencioj. Ni ĝojas, ke estas organizataj diversaj E°-eventoj en nia regiono kaj esperas, ke la esperantistaro partoprenos (kaj raportos por SFS).

Post la tagmanĝa paŭzo okazis debato. Mado Vidal proponis diskuti/decidi pri agado en la lernejoj. Multaj partoprenis la debaton, sed inter deziroj kaj konkretigo estas abismo, speciale en la edukad-sistemo. Ni devas konscii pri la problemoj kaj konsideri, ke la ĉefa afero, ĉies afero, estas **konvinki** homojn pri la utilo kaj neceso de E°. Ne sufiĉas stelo sur veturilo aŭ sur koverto, ni devus ĉiutage atesti pri travivaĵoj kaj bone argumenti por esperanto, ne necese kontraŭ aliaj lingvoj. Ĉiuj konkretigeblaj ideoj estas bonvenaj.

Sekvis "prelegeto" (laŭ lia difino) de Daniel Moirand, kiu rakontis al ni diversajn amuzajn kaj kuriozajn, mirindajn anekdotojn pri la vivo de "Marko Polo". Ĉiuj aŭskultantoj atente sekvis lin kaj profitis lian intervenon. Li estas aparte gratulinda pro la ampleksa traduklaboro farita.

Fine ni aŭskultis parton de novaj KDoj (kompakt-disko) kaj provis kanti kun Meven (Bretona ĥoro) kaj Morice Benin (Inspir' / la landoj ekzistas ne). La kantoj de tiu lasta estis tute aktualaj antaŭ la dua prezidenta baloto! Vendiĝis pluraj libroj de D. Moirand kaj KD-oj.

Ĉar iuj deziris rehejmiĝi ne malfrue, ni rezignis pri la lasta parto de la programo (lumbildoj, filmoj) kaj petas pardonon, de tiuj, kiuj preparis ion (preskaŭ) vane.

Entute interesa tago. Nura bedaŭro: la preskaŭ konstanta uzo de la franca. Kompreneble, kiam ni uzas la francan, povas partopreni la plejmulto el ni, sed ĉu ni vere pretas defendi la internacian lingvon, ne parolante ĝin? La venonta rendezvous estos en Septembro, en Béziers, aŭ se ne eblas, en Montpellier.

Béziers → 28/9

En Septembro ni aperigos anoncojn en diversaj gazetoj por konigi la ekziston de Esperanto, de grupoj, kursoj, renkontoj, hejmpaĝo, ktp. Sendu plej baldaŭ al nia sekretario Charles Gérard Voinçon - 4 Rue Docteur Rives - 66000 Perpignan (Tel/Fax 04 68 55 51 77) indikojn pri gazetoj de nia regiono (adreso, tarifo de anoncoj, ktp). Anticipan dankon!

VIVO DE LA GRUPOJ

BÉZIERS

Staĝo de "la Dragonnière" de la 22a ĝis la 29a de majo 2002 : (raporto de partopreninto)

Ĉiam plezure geesperantistoj kunvenas por printempa staĝo en "La Dragonnière". Tio okazas dank'al la aktivemo de la grupo de Béziers "C.B.E."

La restado estas komforta. Laŭ ĉiuj vidpunktoj : bonaj loĝejoj, grandaj ruldomoj, bonaj kursoj, taŭgaj lernoĉambroj, bona nutraĵo, agrabla etoso. Estas ankaŭ agrablaj renkontoj kun sirenoj ĉe la bela naĝejo kun "varmeta akvo je 24 gradoj".

Estis ankaŭ agrablaj vesperkunvenoj kun ludoj, kvizoj, premioj.

Nia supera kurso bone funkciis, ĝi estis sufiĉe altnivela, kun "serioza" itala instruisto, interesaj tekstoj kaj multaj ekzercoj pri ĉio ajn de nia lingvo.

Venontan jaron estos la 20a datreveno de la efektivigo de la staĝo. Ni invitas ĉiujn samideanojn, el pluraj landoj, multnombre partopreni en majo 2003 de la 14a ĝis la 21a.

La lastaj informoj antaŭ la someraj ferioj :

La forumo de Asocioj okazos sur la Aleoj : Sabaton, la 14an de septembro.

Nia unua kunveno por organizo de kursoj, akcepto de novaj gelernantoj (?) okazos la 21an de septembro posttagmeze en nia ĉambro sur la tria etaĝo. La sekvontan sabaton estas planita la federacia aŭtuna kunveno de la 10a ĝis la 17a horo. Jam rezervu la septembrajn sabatojn (la 14an, la 21an, la 28an) por E° !

La monataj kunvenoj en alia ĉambro estos : la 12an de oktobro (verŝajne sur la teretaĝo, konfirmo de la MVA estas atendata), la 16an de novembro, la 11an de januaro, la 8an de februaro, la 8an de marto, la 12an de aprilo, la 10an de majo kaj la 14an de junio.

Ni rememorigos la datojn en la venontaj SFS, sed jam de nun notu bone tiujn datojn kaj ilin rezervu -po unu fojo ĉiumonate ne estas malfacile ! Se vi havas bonegajn ideojn por agrabligi niajn kunvenojn, partoprenu en niaj unuaj renkontiĝoj kaj alportu viajn proponojn. Vi tre ĝojigos nin.

Zamenhofs Tago :


Ni festos ĝin la 7an de decembro ekde la mateno (10-11h). Poste komuna manĝo kaj distra posttagmezo; ĉiuj estas kore invitataj.

Staĝo :

La venonta okazos de la 14a de majo ĝis la 21a. Pliaj informoj venos en aliaj SFS.

La lasta bone disvolviĝis en La Dragonnière apud Vias. La restado estis komforta. Evidente la klasĉambroj en Batipaume estis pli taŭgaj sed la prezoj multe pli altaj. Oni devas elekti : kiel fari ? La kandidatoj de ekzameno jam ricevis la rezultojn. Sed ni konas nur la sukcesojn de tiuj, kiuj loĝas en Béziers kaj Montpellier.

Ĉi-poste eltiraĵoj de la staĝa bulteno :



Skribu la unuan literon de ĉiu verso
kaj vi trovos la bondeziron
esprimitan komence de la staĝo :

B O N V E N O N

Saluton, karaj geamikoj !

Tutkore ni akceptas vin .

Alloga estas Dragonnière

Ĝia ĉarmo plaĉos al vi.

Uzu ĝin la tutan semajnon

Bone laboru, kompreneble

Elektu la kurson konvenan.

La krokodilon lasu for .

Estu gajaj kaj bonhumoraj !

Nia postino : Fernando

Artikolo redaktita fine de la staĝo laŭ interkonsento de la diversaj "klasoj" :

Kune ni laboris, ni suferis, ni diskutis kaj disputis kaj poste ni ne povis disigi nin . Kial ? Ĉar en esperanto-staĝo. iu kaj io kunigis nian grupon . Unue, afablaj, kompetentaj, sindonemaj geprofesoroj, kiuj scipovis aŭskulti ĉiujn el ni kaj inteligente klarigi la malfacilaĵojn. Due, la sento, ke ni estas farantaj ion grandan por la Homaro. Fakte, ni ĉiuj konfuzes scias, ke iun tagon, la homaro bezonos nin por eliri el sia malliberejo .

Ni elektis faligi la barilojn.

Por tio, ni gelnantoj fariĝu instruantoj . Ek ! Al la laboro !

Senkomento !

Al manĝejo vi estos
ĉiam akurate.

Kompreneble !

Tiel vi manĝos
ĉiam varme kaj
de alloga servistino
simpligos laboron
certe.

Pri via ĉambro zorgos
vi mem tre nete,
krom vi
neniu ĝin balaos ;
pri banejo, duŝo
same.

Al kursoj vi estos
je taŭga horo
ĝuste
tiel vi ne ĝenos
kursanojn brue.

Jipe



Saluto fine de la staĝo

(skribu la unuan literon de ĉiu verso) :

-----!
kaj gratulojn al la organiza skipo !

Ĝis revido, karaj amikoj !

Ideo venis ĉimatene :

Saluti vin per akrostiko.

La staĝo nun finiĝas glate,
Adiaŭi vin, fariĝas ludo.

Revenu do en vian hejmon,

Estu sanaj la tutan jaron,

Vi tiam pretos sen problemoj

Iri denove al Sud-Francio,

Deĵori kiel lernemuloj,

Ombre de bela verda stel'.

Fernande Terral


29/05/02

Pour la presse .

Durant une semaine, 40 espérantistes de diverses régions se sont réunis à Vias, pour un stage de perfectionnement ou de découverte de la langue internationale ESPERANTO .

Quatre niveaux de connaissance ainsi que des examens ont été proposés aux divers participants .

L'Espéranto, comme on le sait, est une langue parlée dans le monde entier par des gens convaincus de l'utilité d'avoir un moyen de communication international non hégémonique et d'une grande précision. Ne peut-on pas comprendre qu'une langue internationale, protégeant l'identité de chaque nation, peut être utilisée comme moyen de communication directe entre les Européens ?



La grupo de Béziers kaj la unua de Majo 2002 :

La grupo de Béziers, kun aliaj asocioj, partoprenis la defiladon de la Unua de Majo tra la urbo, kiu ĉi-jare havis specialan signifon. La granda verda flagrubando "ESPERANTO -communication internationale" estis tre rimarkata.

Antaŭe, la prezidantino S. Azuthier, J-P. Peray, M. Vidal kaj J. Maurel renkontis ĵurnalistinon ĉe la ĵurnalo "L'Hérault du Jour", kiu aperigis artikolon pri Esperanto.

Post tiu matena intervjuo kaj defilado, la triopo Jean-Pierre, Mado kaj Line iris al Narbonne kaj kuniĝis al Marie-Line kaj Olivier, junaj novaj geesperantistoj de Agel (34). Monique kaj Francis Bernard alvenis kun sia budo, ĉar tie okazis asocia manifestacio, unue malpermesita kaj pri kiu ni estis avertitaj lastmomente. Do tie ni havis budon por prezenti Esperanton meze de aliaj asocioj. Ni multe diskutis, donis informojn, disdonis paperojn. Multaj personoj interesiĝis, eĉ junulino deziris aĉeti vortaron, ĉar ŝi perrete lernas esperanton kun sia patro. Pluraj donis siajn adresojn. Bedaŭrinde la muziko tro bruemis, ni restis ĝis la unuaj pluvgutoj.

La kuboj estas ĵetitaj, nur restas prognozi agon en tiu urbo. Ĉu eblas instrui en Narbonne? Ĉu krei grupon? Kiuj povos nin helpi? Olivier kaj Marie-Line loĝas je 30 km...

Jacqueline Maurel



Parto de la longa artikolo aperinta en "L'Hérault du Jour" (6/5).
Ĉu vi rekonos tri el la intervjuitoj?

Cercle biterrois d'Espéranto

Fraternité, tolérance et amitié

*Une trentaine de Biterrois parlent la langue universelle
grâce à laquelle ils échangent leurs idées d'amitié et de paix
sans la barrière des mots*



.../...La langue est simple (« pas tant que cela quand même » commente Jacqueline), sa grammaire s'apparente à celle des langues asiatiques.

Aujourd'hui 20 millions de gens de par le monde l'utilisent et bizarrement beaucoup d'Anglais.

« Il faut dire qu'ils en ont assez qu'on estropie leur langue », explique Suzanne qui raconte cette anecdote savoureuse d'un pilote de ligne qui avait signalé en anglais un feu dans son avion (fire) quand la tour de contrôle avait compris cinq (five) et supposé qu'il s'agissait de cinq terroristes.

Ce sont cependant les Italiens, les habitants des pays d'Europe Centrale, les Brésiliens, qui parlent le plus l'Espéranto.

.../...C'est aussi une des raisons qui a fait participer le cercle biterrois à la manifestation du 1er mai derrière une immense banderole.

L'espéranto, c'est aussi un grand plaisir, des congrès internationaux, des voyages, des rencontres.

Suzanne correspond avec un Espagnol, un Allemand de Heilbronn, la ville jumelle de Béziers et deux Tchèques et Jacqueline fait remarquer que dans un congrès à l'étranger, elle peut parler avec tout le monde. « Quand je sors, il ne me reste que le sourire ».

Pour toutes ces raisons et surtout depuis la naissance d'Internet et à la multiplication des sites, l'espéranto prend de l'essor.

Il existe même affirme Jean-Pierre des cercles d'espérantistes philatélistes, d'espérantistes catholiques, de protestants, de juifs et même de communistes.

Bref, nous avons rencontré des espérantistes heureux et soucieux de convaincre.

A.M.

MONTPELLIER

Pro multaj feritagoj en Majo la monata kunveno ne okazis. Tamen maturiĝis la ideo de tagmanĝo en restoracio de Le Crès la 15an de majo. 17 geesperantistoj partoprenis. Tre bona manĝo, bona deserto, bona etoso... Poste ni veturigis ĉiujn partoprenantojn al apuda lago; la suno brilis, la aero estis sen vento. La plej kuraĝaj el ni paŝis laŭlonge de la lago; la aliaj sidis sur benkoj. Odoris la genistoj kaj papavetoj. La verda lago, la birdoj, la arboj kaj montetoj donis al niaj okuloj grandan plezuron. Kaj ni povis enspiri bonegan aeron. Poste ni kunveturis ĝis la bushaltejo aŭ rekte hejmen. Ĉiuj estis kontentaj; en aŭtuno ni organizos similan aranĝon.

Speciala datreveno:

Sabaton, la 15an de junio okazis la lasta monata kunveno de la grupo en ĉiesdomo "L'Escoutaire". Post la kunveno atendis... pli ol 40 gesamideanoj, ĉar ni ankaŭ festis specialan jubileon kaj honoris nian amikon Leo Lentaigne, okaze de la 70a jariĝo de lia poresperanta agado.

Partoprenis ne nur Montpellieranoj kaj iliaj familianoj sed ankaŭ esperantistoj de Béziers, Lozère, eĉ de Belgio (Ges. Bouman). Annick Tora bonvenigis ĉiujn, senkulpigis plurajn personojn kaj esprimis sian ĝojon pri tiu evento.

Tre feliĉa kaj kortuŝita, nia amiko parolis pri sia konstanta agado, ege grava por la movado. Josée Boccadifuoco donacis belan planton al la heroo de la tago. A. Capus kaj J. Hénin ankaŭ gratulis nian amikon kaj majstron. A. Tora legis leteron de T. Saladin kaj P. Taupiac legis tekston, kies titolo estas memorinda: "provi, pruvi, pravi".

Fine J. Boccadifuoco kaj J. Dumas interpretis senhezite amuzan skeĉon.

Ni trinkis honore al Leo kaj je la sano de ĉiuj ĉeestantoj. Vizitis nin la estro de ĉiesdomo Escoutaire.

Abunda kaj bongusta tagmanĝo sekvis en simpatia etoso kaj amikaj babiladoj. Dankojn al ĉiuj, kiuj pretigis kaj alportis la diversajn manĝaĵojn, bonajn vinojn kaj specialan dankon al G. Gonthier, malhelpita, pro la belaspektaj kaj bongustaj ĉerizoj el lia farmobieno.

Je la 17a horo ni adiaŭis kaj rendezuis je la 8a de septembro, tago de la asocia forumo.

Al ĉiuj agrablajn somerferiojn!



Léo Lentaigne (maldekstre) kun geamikoj

28a Internacia Semajno ĉe Mediteraneo:

Lasta novaĵo: Stefan MACGILL akceptas reveni al Sète por gvidi kurson. Tiel li kompletigos la instruistan teamon, kiu jam konsistas el Pierre BABIN kaj Marjo GUZZI. Kun plezuro ni revidos liajn filinojn Maria kaj Anjo.

Tiu internacia semajno okazos en Sète ("kun la piedoj en la maro sub la pinoj") de la 24a ĝis la 31a de aŭgusto. Informoj kaj aliĝoj: Yvette Vierne 5, Rue du Docteur Roux 34090 Montpellier Tel: 04 67 54 15 43

PERPIGNAN

Somere la Kultura Centro estas malfermata ĉiun sabaton inter la 9a kaj 11a horoj.

Kiel ĉiujare aperitivo signis la finon de la kursoj, partoprenis dek esperantistoj. Ĉijare tri novaj personoj komencis la elementan kurson. Ni deziras bonan resaniĝon al S-roj Figueira kaj Ghelfi.

En la n° 311 de "La Semaine du Roussillon" tuta paĝo estis dediĉita al René Llech-Walter okaze de lia 96a naskiĝtago. Akompanis grandformata bildo kaj grandlitera titolo "Humaniste, Catalan et fier de l'être!".

Parto de la longa artikolo koncernis la poresperantan agadon de nia pioniro (vidu ĉi-poste).

Ĉar estis menciita la grupo de Prades, Christian Pinard, ties respondeculo, sendis al la gazeto informojn pri la kursoj, kiuj aperis en la sekvanta numero (vidu ankaŭ ĉi-poste).

.../... Une de ses grandes passions, parmi tant d'autres, reste la promotion de l'espéranto, cette «fenêtre ouverte sur le monde». Cette langue, dit-il, est une passerelle entre tous les peuples de la terre. Ce qui la différencie des 3500 autres

langues répertoriées dans le monde, c'est sa simplicité. Un an suffit pour manier l'espéranto sans problème «ce qui ne signifie pas qu'elle est pauvre, sans finesse et sans nuance. L'espéranto est aussi riche que l'allemand, le japonais ou le russe,

affirme-t-il. Nos détracteurs voient dans l'espéranto une menace pour les autres langues. C'est complètement faux, elle est seulement un outil qui jette une passerelle entre tous les peuples du monde pour faciliter l'échange et la communication». .../...

L'espéranto, ça se parle

Dans votre numéro n°311, (p.25), vous consacrez un article très intéressant à M. René Llech-Walter. Sur cette même page, dans un encadré intitulé "L'espéranto aujourd'hui", vous écrivez "Un autre Centre fonctionne également à Prades"; c'est à ce sujet que je vous écris.

En effet, depuis le début de cette année j'ai mis en place un cours d'initiation à l'espéranto, et ce grâce aux échos favorables qu'a rencontrés mon "courrier des lecteurs" que vous avez bien voulu publier en décembre dernier ("Appel aux espérantistes") ! Une dizaine de personnes se sont montrées suffisamment intéressées pour suivre les cours.

La plupart préfèrent travailler à la maison (les autodidactes sont légions en espéranto, tant par la facilité de l'étude - avec un minimum d'application-, que par l'éloignement des groupes existants); quelques-uns assistent régulièrement au cours d'initiation. De toute façon, avec un niveau moyen, la présence d'un groupe devient nécessaire pour pouvoir pratiquer la langue à l'oral : car l'espéranto est une langue bien vivante, j'ai pu m'en rendre compte lors du congrès des cheminots espérantistes (FFEA: Franca Fervojisto Esperanta Asocio) qui s'est tenu à Port-Vendres le mois dernier ! Si vous souhaitez plus de précisions, voici donc des informations pratiques concernant ces



L'Espéranto, aujourd'hui

Selon les chiffres cités par René Llech-Walter, 12 millions d'adeptes de cette langue sont dispersés à travers le monde, dans tous les pays. Tous les ans, un Congrès Mondial rassemble de 3 à 5.000 personnes dans un pays chaque année différent. Dans notre département, un millier de personnes pratiqueraient cette langue créée en 1887 par le Polonais Żamenhof à partir de racines appartenant essentiellement aux langues romanes. Il existe un Centre Espérantiste à Perpignan, 72 avenue Général de Gaulle où sont donnés des cours, le mardi à partir de 15 heures. Un autre Centre fonctionne également à Prades. M. Llech-Walter pense que la création de l'Euro devrait favoriser l'expansion de cette langue qui pourrait devenir la langue auxiliaire de l'Europe. L'an dernier, Port-Vendres a accueilli le Congrès International des Cheminots Espérantistes et des échanges sont évidemment organisés mettant en relation des Espérantistes aussi différents que des Chinois, des Japonais, des Italiens, des Américains ou des Français.

P-O : El "La Semaine du Roussillon"-Perpignan (ĉi-supre) kaj Prades (maldekstre). Ankaŭ mencio en "L'Indépendant" (2/5) de la partopreno de esperantistoj en la defilado de la Unua de Majo en Prades .

cours d'initiation :

- ils se tiennent chaque vendredi, de 13h30 à 14h30, au local de l'association Mosaïque, situé au 85 de la rue du Palais de Justice à Prades ; (régulièrement, Yannick, jeune espérantiste perpignanais, vient nous prêter main forte pour le cours).

Pour plus de renseignements, on peut me contacter chez moi (le soir ou à midi, car je travaille en journée):

Christian PINARD, 23 rue de l'hospice, 66500 PRADES - tél. 04.68.05.24.41
christian.pinard@laposte.net

Christian PINARD

PRADES



Les slogans contre Le Pen ont pu se lire en français, mais aussi en espagnol et même en esperanto.


PRADES

"Esperanto-Conflent", verda stelo el Canigou, estas nova rethejmpaĝo, kiu donas informojn pri esperanto, speciale pri la diversaj manieroj por lerni esperanton .

Bonan sukceson al ĝi !

<http://perso.wanadoo.fr/esperanto-conflent>

La 27an de junio estis prezento de E° al loka asocio (Association laïque en Conflent)



Turisma semajno : Sude de Prades, en vilaĝo **Valmanya**, estas anoncata renkontiĝo, organizata de AJE (Asocio de Junaj Esperantistoj) **de la 22a ĝis la 28a de julio** .

Vidu detalojn sur la sekvanta paĝo . Partoprenos eksterlandaj esperantistoj (laŭdire el Skotlando, Italio, ktp) . Tre favoraj prezoj . Informas Jean-Luc (05 56 08 01 52) aŭ SFS .

PRINTEMPAJ KONGRESOJ

Al Vigy apud Metz venis pli malpli 125 esperantistoj por la **Sat-Amikara kongreso**. Al tiu nombro aldoniĝis 25 gejunuloj de Jefe. Interesa programo kun kunvenoj, debatoj, koncertoj, ekskursoj kaj prelegoj de G. Kersaudy (aŭtoro de "Langues sans frontières"), pri ekoturismo, uzo de E^o en komputiko kaj interreto, Unesko-kampanjo, Attac, "Amikeca Reto" *. Diversaj budoj reprezentis neesperantistajn organizojn.

En **2003** Sat-Amikara kongresos en **Cap d'Agde**, en **2004** en **La Roche-sur-Yon (Vendéo)** kaj en **2005**, en Norda Francio proksime de **Boulogne sur Mer, kune kun ĉiuj francaj E^o-organizoj**.

**Pri "Amikeca Reto": ĝi provas ebligi ĉiaspecajn amikajn rilatojn kaj klopodas rilatigi homojn. En la nova adresaro estas 400 adresoj en 54 landoj. Male al "Pasporta Servo" ĝi ne proponas gastigadon sed amikan akcepton. Ekzemplero de la nova eldono estas akirebla ĉe SFS kontraŭ 10[€], ankaŭ aliĝilo por la venonta eldono. Adreso de la asocio: 88, Rue Victor Hugo 37400 Amboise.*

UFE kunigis centon da personoj en Strasburgo je Pentekosto. Detaloj estas legeblaj en "Le Monde de l'Esperanto". Novaj komitatanoj: X. Godivier kaj J. Mathieu, du junuloj, kiuj ambaŭ eniras la estraron. La nova estraro konsistas el: prezidanto - C. Longue-Épée; vicprezidanto pri rilatoj kun la gazetaro - B. Flochon; vicprezidanto pri kulturo - C. Nourmont; ĝenerala sekretario - O. Moreau; kasisto - J.-L. Texier; informado kaj rilatoj kun la federacio - X. Godivier; rilatoj kun la sidejo - J. Mathieu.

La venonta kongreso okazos en **Grejzono** kaj la federacio **Rodanalpa** invitis por **2004**.

Kongreso de Sat-Amikaro kaj restado en Palatinato dum Paskaj ferioj:

Kvaropo de Hérault partoprenis en la kongreso de Sat-Amikaro en Vigy, apud Metz, de la 30a de marto ĝis la 2a de aprilo. Jacqueline kaj Maurice Dumas, Jeanine Bony el Montpellier kaj Jacqueline Maurel el Béziers. Vojaĝinte per veturilo, ni admiris la placon Stanislas en Nancy kaj vizitis Metz. En Vigy, la materialaj kondiĉoj kaj akcepto estis bonaj en la Centro. La kongreso honoris Raymond Schwartz, infanon de la regiono. Konferencoj, teatraĵoj, muzikoj distris la kongresanojn. La filino de R. Schwartz kaj kelkaj amikoj rakontis amuzajn anekdotojn el lia vivo. De la fermita stacidomo de Vigy ni vojaĝis per privata trajneto dum dekdu kilometroj tra la arbaro.

Post la kongreso ni veturis al Waldfischbach en Palatinato, Germanio, je distanco de 160 km. Tie ni loĝis dum tri tagoj, okaze de la "Printempa semajno Internacia". La akcepta domo kaj la kamparo estis tre belaj. La vilaĝo kaj Pirmasens (plej granda urbo), bombarditaj dum la lasta milito, estis rekonstruitaj kaj ornamitaj per multnombraj floroj. Sur monumento de la milito kuŝas la nomoj de junuloj 16 kaj 17-jaraĝaj. En la centro ni restadis 164 el multaj landoj (Germanoj, Belgoj, Armeno, Hungaro, Brito, ktp). Estis multaj infanoj, kiuj parolis pli bone esperanton ol siaj gepatroj, ĉar ili parolis malrapide kun bona akcento. La plej juna estis 7semajna bebo (ĝi diris "areu" esperante kaj dormis ofte); la plej aĝa estis belga virino 87jara.

Ni povis paroli esperante kun ĉiuj personoj en la Centro, sed ekstere en la vilaĝo ni ricevis nur afablajn ridetojn. Ni ĝuis belegan veteron kaj bonegan vojaĝon: "Volonte ni ŝatintus resti pli longe en tiu verda paradizo"...

Jacqueline Maurel

AMIKA SEMAJNFINO EN CAMPAGNAN


Por la "tria" eldono de la amikaj semajnfinoj ni kuniĝis ĉe Gilbert kaj Marité Santos en Campagnan, proksime de Pézenas. Akceptis nin griza vetero sabate... sed ankaŭ la varmkoreco de la gastigantoj. Sabate partoprenis nur deko da geesperantistoj. Tiel ni havis la okazon interŝanĝi ideojn, viziti la vilaĝon, eĉ kunkanti.

Dimanĉe, male, la vetero pliboniĝis kaj la suno radiis. Partoprenis proksimume 25 personoj el la diversaj anguloj de nia federacio: el Gard, Lozère, Hérault (Béziers kaj Montpellier), P-O (Perpignan/ Prades). Pluraj estis malhelpataj veni, speciale pro la tiutaga baloto, kaj senkulpiĝis.




En granda "marabuo" (tendego) ni trinkis aperitivan je la sano de la esperantistaro, multe diskutis kaj klaĉis, ĝuis la lokan muskatvinon, la bonegan tagmanĝon kaj la amikan etoson. Ĉar iuj devis voĉdoni, ni devis fini la semajnfinojn iom frue (je la 16a h). Ĉiuj partoprenintoj estis kontentaj pro la varma akcepto kaj la konatiĝo kun novaj esperantistoj, ankaŭ pro la revido kun geamikoj.

Gratulindas Gilbert kaj Marité, kiuj gvidis kaj gastigis nin, ankaŭ tiuj, kiuj senbrue preparis la semajnfinojn, kiuj kuiris por satigi kaj kontentigi la ĉeestantojn (elstaris la sangrio, paeljo, apraĵo), kiuj afable servis... kaj la homoj, kiuj venis foje de malproksime.

Ni jam rendezvas por la 4a amika semajnfino en 2003. Kiu konsentus organizi ĝin? Nepras tiaj neformalaj renkontiĝoj por pli bone interkonatiĝi. Ĉu plani ion komunan kun la federacia "kongreso"? Ekzemple "kongreson" sabate kun "arta"/distra vespero kaj neformalan kunvenon samloke dimanĉe? Pripensu kaj sciigu! Ĝis!



6a E.M.A RENKONTIĜO



ARANĜOJ

Larzac : La ekologia revuo "Silence" organizas, okaze de sia 20a datreveno, kampad-restadon ĉe Cun de Larzac . Inter la diversaj proponataj temoj : esperanto. Aliaj atelieroj estas pri ekologio, malperforto, alternativoj. Okupiĝoj : gimnastiko, piedmigrado, banado; renkonto kun Larzakaj kamparanoj .
Kontaktadreso : Silence / 20 ans - 9, Rue Dumenge 69004 Lyon .

Ariège :

Disvolviĝos samtempe tri staĝoj en Montferrier (piede de Montségur) **de la 27a de oktobro ĝis la 2a de novembro** : Ĥorkantado kun Martina Gazdek el Kroatio, eko-turismo kun Anne Amblès kaj inicadkurso de E° kun Rikardo Cash . Aliĝiloj estas haveblaj de SFS .

Alicante :

Post la Sat-kongreso komence de Julio, Alicante gastigos la Hispanan E-kongreson de la **1a ĝis la 4a de Aŭgusto** . Laŭ ricevitaj informoj, "la klimato estas varmeta, agrabla kaj stabila en Aŭgusto" (Ĉu vere?) Okazos ekskursoj al Benidorm, Elche kaj Valencia . Ebleco plilongigi la restadon
Informas : Aŭgusto (!) Casquero, fakdelegito en Valencia .

Cambrils :

La 10a Internacia E-semajno okazos tie **de la 19a ĝis la 26a de oktobro** . Urbeto Cambrils estas en la provinco de Tarragona /Katalunio . Prelegoj, festoj, kursoj, bus- kaj ŝip-ekskursoj. Loĝado kaj aranĝoj en hotelo Daurada Park (ekzemple 36^E po persono/tago en unuopa ĉambro kun 3 manĝoj). Aliĝo : 21^E ĝis fino de Junio, 24^E poste .
Kontaktadreso : Santiago Tomé, Apartat 423, ES-08200 Sabadell aŭ <luis_serrano@e-milio.com>

Lastminute : Dro Corsetti, nova prezidanto de UEA, prelegos en Cambrils pri UEA .

De la 22a ĝis la 28a de julio 2002

En la montaro de KANIGU(CANIGOU franclingve) proksime al Perpignan(66)
En la vilaĝo VALMANYA, en la Orientaj Pireneoj , domejo « Le Roc de l'Ours »

Situacio de la domejo :

Tiu domejo situas en la valo de Kanigu, En etoso de grandaj arbaroj kun la vido de la Piko de Canigou.
Oni loĝos je 900 metroj da alteco, kaj tiu ŝtondomo situas apud piedmigradaj vojoj de GR 10 kaj GR 36. Oni estos je unu horo de la maro kaj de Hispanio. Se vi alvenas en Perpignan trajne, estas busoj (kondiĉoj de horaro en la stacidomo).

Gastigaj kondiĉoj :

La domejo Le Roc de l'Ours havas 24 ĝis 26 dormoĉambrojn de 2 aŭ 3 litoj kun mebloj kaj kovertoj.
La manĝo-ĉambro havas ĉion eĉ lavmaŝino, fridujo, ktp. La kuirejo estas disponebla kun ĉiuj iloj.
La ludsalono havas televidon kaj estas teraso de 200 M2 Ses banĉambroj kaj necesejoj.

Agadoj :

Eblas piedmigradi, bicikli per VTT, ŝipkanui. Viziti romanajn lokojn, muzeoj, ekzemple de Dali en Figueras)
Vi komprenas ke la programo estos adaptita laŭ la vetero kaj la volo de la partoprenantoj. Do, kunportu muzikinstrumentoj, au ludoj, se vi Havas. Ĉiuj bonvoloj estas bonaj, ĉu ne ?
Do, se vi volas koni pli, telefonu al : 05.56.08.01.52 kaj lasu mesaĝo, se estas neniu.

Ĝis baldaŭ Jean-Luc

31-a KATALUNA KAJ 4-a TRANSPIRENEA KONGRESO DE ESPERANTO

1-2-3 NOVEMBRO 2002

SÓLLER (Majorko)

La urbo, kun proksimume 12.000 loĝantoj situas en fruktodona valo, ĉirkaŭita de la plej alta montoĉeno el Majorko, La Norda Montaro ("Serra de Tramuntana"). Ĉi tiu cirkle malfermiĝas, kiam ambaŭ montoflankoj kontaktas kun la maro, kio naskas la naturan havenon Port de Sóller. De tiu punkto eliris antaŭ la militoj (1936-1939 kaj 1939-1945) famaj lokaj produktaĵoj, kiel oranĝoj, oleo, drapoj k.a., per du same famaj ŝiplinioj, unu al Barcelono kaj alia al Seto (Marsejlo). De tie enŝipiĝis ankaŭ nombro da elmigrantoj.

En Sóller oni povas viziti la preĝejon Sankta Bartolomeo ("Sant Bartomeu"), ekzempla konstruaĵo, havanta plurajn artajn stilojn kaj popolajn travivaĵojn: ĝi montras romanikon en la plej antikva parto, barokan strukturon kaj modernisman fasadon. Laŭ ĉi tiu lasta stilo oni konstruis plurajn domojn fine de la 19a jarcento, ekzemple "Banc de Sóller", "Can Prunera", "Can Nou" aŭ "Can Dulce" (gastigonta la kongreson), ktp.

La loko estas ideala por ekskursi kaj promenadi. Viziti la ĉirkaŭaĵojn kun ĝiaj fontoj kaj ĉarma pejzaĝo prezentas al la ekskursanto delikatan plezuron. La suprenirado tra Barranc, apud Biniraix ĝis L'Ofre, aŭ la grimrado al Puig Major (1470 m) por kiu oni bezonas specialan armean permeson, havigas profundan impreson al la piedirantoj. Ankaŭ la vizito al la proksima urbeto Fornalutx aperas kiel unu el la -plej interesaj kaj ĉarmaj promenadoj.

Aliflanke, partopreni en ĉi tiu kongreso havos specialan sencon: festadi la 75an datrevenon de la antaŭaj samurbaj kataluna kongreso kaj Floraj Ludoj (1927), organizitaj de la Grupo Esperantista Sollerica kaj Kataluna Esperantista Federacio. Nun ni omaĝos soljerajn pinonirojn, kiel Miquel kaj Andreu Arbona Oliver.


PROVIZORA PROGRAMO

Vendredon 01.11.02

11:30 Malfermo de la kongresejo kaj disdono de dokumentoj.
13:00 Solena oficiala inaŭguro en la Kongresejo (aŭ en la Urbodomo) kun la aŭtoritatoj.
14:00 Tagmanĝo
16:00 Prelego
18:00 Prelego
20:00 Vespermanĝo
21:30 Arta Vespero

Sabaton 02.11.02

10:00 Malfermo de la kongresejo
Matenaj ekskursoj
14:00 Tagmanĝo **Dimanĉon 03.11.02**
16:00 Prelego
18:00 Prelego 11:00 Literatura Mateno
21:00 Vespermanĝo 12:00 Verdikto 2-a Premio Delfí Dalmau
22:00 Arta Vespero 14:00 Adiaŭa bankedo



Kongresejo: Centre Cultural "Can Dulce". Str. Gran Via

Kongrestemo: Tio kio estas malgranda, estas bela

KOTIZTABELO

	periodo 1 Ĝis 31.07	periodo 2 ĝis 30.09	poste	tage
A. Kongresano membro de KEA de ties aliĝintaj Grupoj kaj de Transpireneaj Federacioj	24,00	27,00	30,00	10,00
B. Familianoj A	12,00	15,00	18,00	5,00
C. Gejunuloj membroj de KEJ	12,00	15,00	18,00	5,00
D. Kongresano ne membro de la Asocioj sub A	30,00	33,00	36,00	11,00
E. Familianoj D	15,00	18,00	21,00	6,00
F. Infanoj ĝis 12 jaroj kaj Eksterlandanoj	senpage			

Rilate kotizojn, la valida aliĝdato estas tiu de la poŝtstampo. La aliĝilo validas nur kiam la kotizo estas enspezata. La kotizo ne estas repagebla okaze de ne partopreno.

Membroj de la Transpireneaj Federacioj rajtas pagi surloke ĉe la alveno.

Tranoktado

1.-Kolektiva loĝado en Hotelo "El Guia" Castanyer, 3 apud la stacidomo. (Ĉiuj ĉambroj estas dultaj kaj kostas po 72 eŭrojn ĉiunokte kun matenmanĝo-ĉiu homo pagos po 36 eŭrojn-)

2.-Ĉiuaĝaj kongresanoj rajtos ankaŭ senpage tranokti en la kongresejo sur speciala planko, sed nepre oni devas kunporti dormosakon. (Necesejoj kaj duŝejoj estos je ilia dispono).

Bankedo.

Okazos en loka restoracio (prok.prezo 25 eŭroj) Konfirmotaj prezo kaj loko.

Kolektiva vojaĝo

Barcelono-Palma aviadile kaj de la flughaveno ĝis la kongresurbo buse kaj revene. (Prok.prezo 150 eŭroj)

Petu de SFS la kompletan informilon / aliĝilon !

Premio "Delfi Dalmau"**por gazeta artikolo :**

Oni aljuĝos tiun premion al la plej bona populariga gazet-artikolo, kiu pritraktos ajnan aspekton en rilato kun la ekologio de la lingvoj, la lingva (mal)egaleco, la Universala Deklaracio de Lingvaj Rajtoj, aŭ la ebla aŭ faka kontribuo de internacia lingvo kiel E^o sur ĉi-tiu kampo. Konkursaĵoj estu en la kataluna kaj/aŭ en E^o. La tekstoj ampleksos minimume 5 kaj maksimume 10 foliojn A4, tajpitajn je duobla spaco kaj liverotajn en 5 ekz. La monsumo de la premio estos 450^E. La tekstoj aperos en diversaj periodaĵoj. La limdato por la akcepto de la originaloj estas la 31a de aŭgusto 2002. Rezulto proklamota en la kadro de la 31a Kataluna Kongreso en Sóller (Majorko) la 3an de novembro.

Petu la kompletan regularon de SFS !

Turisma dokumento pri Katalunio :

Ĝi estas 16paĝa, kvinlingva kaj grandformata (30x45 cm). Ĝi estas bela, montrinda, uzinda por konvinki respondeculojn pri la uzo de E^o. Ĝin eldonis la Ĝenerala Direkcio de Turismo de la aŭtonoma registaro de Katalunio. Gratulojn al la Katalunaj Esperantistoj pro tiu bela atingaĵo. Ĝi estas senpage havebla de: Secció de Publicacions, Direcció General de Turisme - Generalitat de Catalunya ES-08080 Barcelona (Retadreso: mlianos@correu.gencat.es)

Brazila muziko :

Se vi ne iros al la UK de Fortaleza, vi povos tamen ĝui brazilan muzikon hejme. La unua albumo estas de brazilaj E^o-kantisto Tarcisio Lima kun la titolo "Verdstelaj Brazilajoj". Temas pri 13 originalaj, famaj brazilaj kantoj en E^o. La disko estas mendebla ĉe la grandaj libroservoj aŭ ĉe UEA Niuwe Binnenweg 176, NL - 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Rete: libroservo@co.uea.org. La dua estas altkvalita Kompakt-Disko kunproduktita de Flavio Fonseca kaj estas la unua volumo de kolekto aperonta. Rekomendinda por bazaj kaj daŭrigaj kursoj aŭ per persona ĝuo. Ĝi estas en la katalogo de Vinilkosmo (F.Martorell) sub referenco VKKD 51.

Fakaj retlistoj :

Se vi interesiĝas pri iu aparta temo (aŭ se konato de vi interesiĝas), jen kelkaj ret-eblecoj:
per-esperanto-ghenerale@yahoo.com
aŭ anstataŭigu "ghenerale" per bazscienco/ kolekto/ komerco/ literaturo/ medicino/ muziko/ politiko/ teknologio/ turismo. Esperanto ankaŭ praktikeblas hejme!

Pri informoj ankaŭ konsultu :

<http://www.esperanto-panorama.net/franca>

90-minuta elsendo pri Esperanto :

Ĝi okazis en la franca la 21an de junio ĉe "Radio Suisse Romande", kun trafikaj intervenoj de Claude Piron, François Randin, ktp. La titolo: "L'espéranto, un espoir déçu ?" (kun demando-signo). Kasedregistro estas mendebla (ĝis la 20a de julio) al RSR, Service K7, Case postale 319 CH 1701 Fribourg (Tel:026/323 24 24 -Telekopio: 026/322 72 54; <http://www.rsr.ch>) Prezo: 30 FS.

Libroj franclingvaj :**Les bases de l'Esperanto (Marc Bayant)**

Sinteza kaj moderna prezento de la Fundamento por franclingvanoj. La 16 reguloj kun la kutimaj eraroj de komencantoj. 10^E.

La cerise sur le béton (Editions Flammarion)

Aŭtoro Vincent Cespedes, profesoro en liceo. Tiu dua volumo kun la titolo "Violences urbaines et libéralisme sauvage" pledas plurpaĝe (210 ĝis 216) por la instruado de E^o. Kiam vi vizitos FNAC-vendejon, legu tiujn paĝojn kaj eventuale aĉetu la libron!

"La manipulation mentale par la destruction des langues" - dua volumo de

"La nova milito kontraŭ la inteligenteco" de C-X. Durand / Eldonoj F-X. de Guibert ISBN 2868397719

La aŭtoro montras kiel lingvo kaj kulturo estas nedisigeblaj kaj kiel unika lingvo estigas la aliĝon al principoj kaj valoroj produktataj de la kulturo, kiun ĝi implicas. La defendo de la lingvoj, de la kulturoj kaj de la plureco ne estas opereta militeto. Uzo de unika lingvo kondukas al unika penso... Multaj observaĵoj kaj referencoj por mem esplori.

PIV : Plena Ilustrita Vortaro :

La dua eldono fine aperis. Ricevos ĝin prioritare la partoprenantoj de la Sat-kongreso en Alicante. La vendoprezo devas esti proksimume 70^E. Tiu dua eldono estis funde reviziita, aktualigita kaj la ilustraĵoj estas enkorpigataj en la teksto mem. La libroservo de UEA anoncas ĝin je la prezo de 78^E + 10% sendokostoj kaj 6% imposto (TVA) Mendoj de 3 ekzempleroj samtempe ricevas sesonan rabaton (16,66%)

Baza esperanta radikaro (de Pilger Wouter)

"Okazas" de Aprilo prezentas ĝin tiel:
"Le premier mini PIV pour élèves".
Vendoprezo de E^o-France: 12^E85 + sendkostoj

Serioza bulteno ?

"Valeurs mutualistes", la bulteno de MGEN (mutualo por geinstruistoj) recenzis en aprilo la libron de G. Kersaudy sed forgesis mencii la solvon proponitan de li. En Majo artikolo titolis "Francio, lando de 6700 lingvoj kaj lingvaĵoj" kaj konkludis, ke la angla aspektas nun la unua minoritata lingvo de Francio. Leganto kontestis la ciferon en la junia n^o.

EDUCATION, LANGUES ET POLITIQUE

La chose est passée presque inaperçue à cause des élections . En mai s'est tenu le traditionnel Parlement des Enfants . Les places des députés à l'Assemblée Nationale ont été occupées par 577 délégués des écoles primaires . Une proposition de loi a été choisie par ce Parlement des Enfants, qui sera ensuite soumise à l'examen de la nouvelle Assemblée Nationale avant d'être adoptée comme loi . Cette année, la proposition a été que chaque école de France soit jumelée avec une autre école d'Europe . Bel exemple d'ouverture des jeunes Européens ! Affaire à suivre ! Le français ne pourra suffire pour les échanges; il sera sans doute fait usage aussi de l'anglais (M. Ferry, le nouveau Ministre de l'Education a modifié le calendrier de généralisation de l'anglais dans les classes) . L'espéranto ne pourrait-il avoir aussi sa place dans ces échanges ?

Sujet proposé au bac en philosophie pour certaines sections : "La diversité des langues est-elle un obstacle à l'entente entre les peuples ?" . Extrait de la correction "modèle" proposée sur internet : " De fait, la diversité des langues n'est pas un obstacle radical à l'entente . C'est une évidence : les langues s'enseignent et s'apprennent ! Elle n'empêche pas les peuples et les nations de commercer, d'élaborer des politiques économiques, sociales, culturelles, etc, communes (exemple de l'Union Européenne) . A terme, pourrait alors s'imposer le rêve ou l'idéal d'une langue unique, supprimant définitivement l'obstacle . Ce fut le rêve des inventeurs de l'espéranto..." . "Vouloir supprimer l'obstacle, ce serait supprimer des différences sans lesquelles il n'y aurait pas d'échange de culture et finalement d'entente ! " . Le correcteur a-t-il bien pris la mesure de la réalité et le recul philosophique souhaitables ?

Les promesses ne manquent pas en période électorale . Beaucoup de candidats à l'élection présidentielle sont toutefois restés muets sur le problème des langues et la solution de l'espéranto . C'est pourquoi la réponse de J.Chirac à Vincent Charlot (pour la commission des relations extérieures d'UFE) mérite attention . Nous n'avons pas oublié les remarques de L. Jospin sur l'E°, les propos de C. Allègre sur l'anglais, les pirouettes de J. Lang, l'usage immodéré de l'anglais au lieu du français d'ex-ministres (MM. Richard (candidat au prix de la carpette anglaise), Kouchner, Glavany...) . Nous n'oublions pas non plus qu'en 72 un vœu avait été émis par le Conseil général de la Corrèze, dont J. Chirac était alors président, pour que l'E° devienne "langue à option à tous les degrés de l'enseignement", que dans la nouvelle équipe ministérielle se trouve N. Fontaine, de retour de Bruxelles où elle s'est montrée très négative sur l'E°... La promesse de J. Chirac se limite à transmettre au Ministre de l'Education la demande d'introduction de l'E° comme option au bac, si...si... Vu les réponses toutes prêtes du ministère de l'E.N, ne nous faisons pas trop d'illusions . Restons "esperantoj" (ceux qui espèrent) ! Plus que jamais : provi, pruvi, pravi (voir p.6) !

J.H.

Paris, le 15 avril 2002,

Cher Monsieur,

Vous avez bien voulu appeler mon attention sur le problème de l'Espéranto et je vous en remercie car, comme vous le savez déjà, il s'agit d'une cause à laquelle je suis sincèrement favorable. Même si pour des raisons que vous comprendrez aisément, je souhaite avant tout me consacrer à la défense de la francophonie, j'éprouve une sympathie profonde pour l'espéranto et le projet humaniste qui a présidé à sa création et qui anime plus que jamais ses défenseurs aujourd'hui.

J'estime pour ma part que la progression de l'espéranto, dans le respect de la diversité culturelle qui lui est consubstantiel, serait un facteur puissant d'harmonie et de compréhension entre les peuples.

Il ne fait aucun doute que, si le sort des urnes m'est favorable, je soumettrai au prochain gouvernement, et au ministre de l'Éducation nationale en particulier, la question de son inclusion comme option au baccalauréat, notamment au regard des souhaits exprimés par les élèves et parents, et de la possibilité de recruter suffisamment d'examineurs compétents.

Je vous prie de croire, Cher Monsieur, à l'expression de mes sentiments les meilleurs,

[autographe :] *Bien cordialement*
Jacques Chirac

Jacques Chirac

De plus en plus d'annonces émanant des quelque 2500 organisations ayant leur siège à Bruxelles s'adressent à des anglophones de naissance, écartant les jeunes qui sont allés étudier ou travailler plusieurs années dans les pays anglophones . Bien que cette discrimination ait été condamnée par divers membres de la Commission Européenne, ces organisations continuent à être financées par l'Europe .

C'est pourquoi UEA, l'association mondiale d'espéranto, a pour le principe porté plainte contre la Commission Européenne pour discrimination linguistique . Le professeur Corsetti, président d'UEA, considère qu'il s'agit d'une grave atteinte à l'article 2 de la Déclaration universelle des Droits de l'Homme .

Voir aussi p . 13 la campagne lancée par UFE (France-Espéranto) pour la défense des droits linguistiques .

Esperanto-France, 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris . métro Bastille
 Tél: 01 42 78 68 86 • Fax 01 42 78 08 47
 butiko@esperanto-france.org • www.esperanto-france.org

esperanto
France

lance une nouvelle campagne de collecte de fonds pour financer ses actions de défense des droits linguistiques . Cette campagne concerne des personnes non-esperantistes qui, sans être prêtes à apprendre l'espéranto, soutiennent l'idée, désapprouvent l'ordre linguistique mondial actuel et sont prêtes à aider financièrement . Des dépliants en couleurs (10x21cm) sont disponibles par paquets de 200 exemplaires auprès de E°-France au prix de 15[€], port compris . Paiement à la réception de la facture au CCP Paris 855 35 D .

Kursoj, staĝoj, aranĝoj :

E°-France listigas nun la kursojn kaj staĝojn, kiuj okazis inter sept.2001 kaj junio 2002 aŭ planatajn por la venonta jaro . Se vi respondecas pri iu el ili, informu E°-France, eĉ se vi ne estas membro de ĝi . La listo utilas por inform-petantoj, ĵurnalistoj, ktp .

La enketilo estas havebla ĉe SFS kaj sendenda plej baldaŭ .

Alia demando koncernas la informkompiladon tra la bulteno Okazas . Rimarkoj kaj sugestoj estas ankaŭ bonvenaj . E° estas ĉies afero !

La du mapetoj ĉi-poste (el "Heroldo") ne estas pri la ludo de la diferencoj, ĉar ili estas tro multaj . Temas fakte pri **E°-eventoj dum somero** maldekstre (kaj la mapeto ne estas kompleta . Mankas ekzemple la "semajno" de Sète ĉe ni) kaj de la novaj **Zeo-j** dekstre (E°-objektoj : stratoj, placoj, tabuloj, monumentoj, konstruaĵoj kun la vorto E° aŭ Zamenhof) . Laŭ la kompilado de R. Boré, ili nun superas la ciferon 1300 .

Aujourd'hui,
 trop de MONDE
 ne peut




à cause de

la BARRIÈRE
 de la LANGUE

esperanto
France

Aidez-nous à lutter pour la
 défense des droits linguistiques




Grésillon :

En la lasta SFS aperis la listo de la someraj staĝoj en Grezijono kaj "La Kvinpetalo" . La lasta staĝo estas fakte 10-17 VIII .

La kompleta informilo pri la kursoj, staĝoj, tarifoj, ktp estas havebla ĉe SFS . Samloke Jefe organizos por gejunuloj de la 30a de aŭgusto ĝis la 7a de septembro "FESTO" . Programo : senĉesa festo, tutsimple ! Okazos interalie koncertoj, foto-ateliero, vizito de strangtipa preĝejo, de abelujaro, ktp . Petu informojn !



KRUCVORTOJ

Horizontale

- I) - Marista kvitanc(o).
 II) - Vulpovost(o).
 III) - Returnita surstrat(o) / s : Sledo.
 IV) - Turka oficir(o) / s : Akto / Botelej(o).
 V) - Ti(o) por miskalkulema piulo / Pra(a).
 VI) - Persa dinastio.
 VII) - Rezona pruv(o).
 VIII) - Mise lant(a) . Ebie tuto.
 IX) - Ostra litero / Io radike / Bedaùre !
 X) - Helena mont(o) / Memoj.

Vertikale

- 1) - Sovetio.
 2) - Terverma Ordo.
 3) - Norda insul(o).
 4) - Unubloka / Radikal(o).
 5) - Al restoracio ! / Duoncentono de krono.
 6) - Data mallongigo / Afrodizigaj(o).
 7) - Hibrida best(o) / Metalo.
 8) - s : Tempo / Kiel borderaĵo.
 9) - En voremaj intestoj.
 10) - Por kuraci.

s : sone

BOPARO

Plena Ilustrita Vort(lud)aro (El "Esperanto" -Majo 2002)

Margene la maristo diris, ke la maro jam ĝenas lin. Ĉu ĉiu rom-ano skribas romanojn?

La inventisto faris inventaron de sia invent-aro.

Estis konfirmitaj liaj firmaĵoj.

Mi konas knabinon, kiu estas sola, sed ne ŝatas konsolon.



De l' longa iro li ricevis deliron.

La elpafita kuglo faris truon tra peza trapezo.

Ĉu minado de oro fariĝas minora?

La oro kaŭzis sur la tero multan teroron.

Kara, estus vane veturi al la kongreso karavane.

La frazoj estis ordigitaj tiel, ke ĉiu para frazo estis parafrazo.

Poste venis ulo kun stranga postulo.

La vojaĝo estis malagrabla pro la voj-aĝo.

Kiel konkrete oni kaptas konkojn? Ĉu per retoj?

Ĉu ankaŭ prioroj sopiras pri oro?

**SUPERFLUAJ LITEROJ**

Forprenu unu literon kaj faru alia(j)n vorto(j)n
 Ekzemple : Floro / Rolo - Lakto/ kato/ kota / tola
 Broso - bruli - disko - dogmo - kurso - okulo -
 kvadranto - katri - kerno - kovri - koliko -
 komploto - konto - foiro - frako - kora - formo -
 fonto - formala - frazo - fulmo - forno - marĉo -
 masko - meblo

Simpla sperto : Helpeto por disvastigi Esperanton

Vendredon vespere, je la kvina kaj duono, mi foriras el la domo de Ges. Dumas kaj iras ĝis "Corum", kie mi eniras la tramon. Kiel kutime en tiu horo, ĝi estas plenplena. Feliĉe, kiam mi alproksimiĝas fotelon, iu ekleviĝas kaj jen, mi sidiĝas apud juna virino kaj vidalvide al du junulinoj. Ĉiam mi veturas per busoj kaj tramo, kaj en mia sako kuŝas esperanta libro.

Mi malfermas ĝin por rememorigi : "Estas mi esperantisto". Kelkajn minutojn poste, la virino apud mi ekparolas

-Ŝi : Kiun lingvon vi legas ĉi-tie ?

-Mi : Esperanton.

-Ŝi : Ha ! Esperanto ?

-Mi : Ĉu vi konas Esperanton ?

-Ŝi : Ne, sed mi aŭdis, ke ĝi estas internacia lingvo, ĉu ne ?

La junulino, kiu sidas fronte al mi, miksiĝas en la konversacio, demandante precizigojn kaj jen, mi komencas rakonti la devenon de Esperanto, Doktoron Zamenhof, la ĉeeston de junaj geesperantistoj en la Eŭropa Parlamentejo, la eblecon prezenti esperanton en la abiturienco, ktp...

Ili demandas, kie oni povas lerni Esperanton, sed ni havas malmulte da tempo, ĉar ili devas eliri la tramon, do mi indikas : "M.P.T. L'Escoutaire". Antaŭ ol forlasi la tramon, ili dankegas min pro tiuj klarigoj, kaj mi sentas min fiera pro tiu B.A. (bona ago).

J. B.

**La venonta SFS aperos en oktobro . Sendu viajn kontribuojn ĝis la fino de septembro al
 Jean Hénin -Beauregard - Route de Montcayroux -48500 La Canourgue
 Telefono kaj telekopio : 04 66 32 86 36 Rete : Jean.Henin@wanadoo.fr**